

# TEA-BULTENO

9<sup>A</sup> JARO

MARTO - APRILO 2006

NUMEROJ 3-4

Uno per tutti... cinque per mille all'esperanto  
Unu por ĉiuj...

**kvin promiloj por esperanto!!!**

Atente legu la ĉi-suban informon! Danke al ĉi-suba reago, al ĉiam atenta informiĝado, al senhezita decidemo de nia prezidanto Edvige Ackermann, Triesta Esperanto-Asocio estas enlistigita inter tiuj Volontulaj Asocioj, kiuj rajtos ricevi la kvoton de 5% el enspezimpostoj. Por ke ĉio ĉi estu kiel eble plej komprenebla, mi publikigas komplete la prian informon itallingve. Disvastigu ĝin inter viaj konatuloj, amikoj, parencoj, simpatiantoj ktp tra la tuta Italio!!!

La legge Finanziaria 2006 (23 dicembre 2005, n. 266, articolo 1, comma 337) ha previsto per l'anno 2006, a titolo sperimentale, che i contribuenti possano destinare una quota pari al 5 per mille dell'imposta sul reddito delle persone fisiche (IRPEF) a sostegno di determinate iniziative di rilevanza sociale.

Tra i soggetti destinatari di tale beneficio, iscritti in un apposito elenco tenuto dall'Agenzia delle Entrate, riguardante anche le Associazioni di volontariato, ci siamo anche noi,

**Associazione Esperantista Triestina,  
con il nostro codice fiscale 90012340320.**

Per destinare la quota del 5 per mille alla nostra Associazione, occorre indicare il suo numero di codice fiscale nell'apposita casella della dichiarazione dei redditi (UNICO, 730, ecc.), oppure della scheda ricevuta insieme con il CUD. Chi è esente dalla presentazione della dichiarazione dei redditi, deve inviare la scheda all'Agenzia delle Entrate, oppure consegnarla al datore di lavoro nel caso ci si avvalga della sua assistenza fiscale. Tutti lo possono fare, non è necessario essere esperantisti.

**Ricordate:** firmando, **non si paga niente di più** di quello che comunque è dovuto per IRPEF. Si può però **sostenere validamente l'attività della TEA, senza costi aggiuntivi**, ed anche avere la soddisfazione di scegliere personalmente come spendere una quota (sia pur modesta) del bilancio dello Stato.

E la prossima volta che ti dicono che lo Stato non finanzia l'esperanto, rispondi: "L'ha fatto! Grazie a me!"

## LETEROJ DE AVĈJO

*la lingvo estas la haŭto de l' animo*  
F. L. CARRETER, lingvisto  
(1923-2003)

*Karaj TEA-anoj,*

*ĝuste al vi iris mia penso, antaŭ kelkaj tagoj, dum budhana seminario, kiun mi vizitis. Ĝin estris Venerinda Lamao Ghesè Sherab Amipa Rimpoché – fondinto de la loka budhana centro laŭ Tibetana tradicio Sakya – kiu instruis pri "La Budhao de Medicino", specife pri la kuracaj reguloj de la psikofizika dimensio de l' homo.*

*Certe vi demandos: kiamaniere tio rilatas al esperanto?*

*Bone. Ne estis precipe la argumento kiu interesis min, sed la aliro al la budhana filozofio/religio, kiu – per ege simplaj vortoj dirite – celas konduki homon al "feliĉo" tra laŭgrada primeditado pere de la miljaraj pensoj de Budhao.*

*Tre interesa la prezento de Lamao, sed preskaŭ ne komprenebla pro la laŭfrazo tradukado. Li parolis anglalingve per ege efika interpretistino, sed la daŭraj interrompoj post ĉiu frazo tute malebligis sekvi la periodan argumentadon.*

*Daŭre mi pensis: "Benita estu Esperanto!", permesanta rektan interkompreniĝon. Imagu: li elcerbumis siajn pensojn en tibetana lingvo, ilin tradukis en la anglan kaj la interpretistino tradukis denove itallingven. Eĉ se li scipovas tre bone la anglan – ĉar fakte en la hinda-himalaja regiono la angla estas vaste parolata, specife inter pensuloj – la pensmaniero, la profundaj konceptoj de la budhana doktrino ne kongruas kun la okcidenta pensmaniero, precipe kun la angla lingvo, kiu estas tre praktika, ege fora de la orienta cerbumado.*

*Vi povas objeti, ke ankaŭ esperanto estus por li fremda lingvo kaj, kiel ajn, li devintus traduki sian penson en la helplingvon: sed almenaŭ ni ambaŭ estus samnivele kaj surtute esperanto estas neŭtrala lingvo, do ne kunportas spurojn de specifa kulturo.*

*Tiu ĉi ekzemplo devas ĉiam pli instigi nin al pli efika agado, ĉar la celo estas bona. Ege.*

*via Avĉjo*

Marta Programo	
03 - vendredo	20.00 - Videofilmo pri Triesto
07 - mardo	20.00 - Laboroj por TEA-100-jariĝo
10 - vendredo	20.00 - Verboj kun prepozicioj: tradukado al itala
14 - mardo	20.00 - Laboroj por TEA-100-jariĝo
17 - vendredo	20.00 - Unua tradukvespero pri sensoj: la vidado
21 - mardo	20.00 - Laboroj por TEA-100-jariĝo
24 - vendredo	20.00 - <i>Lecturae Dantis</i> en Esperanto
28 - mardo	20.00 - Laboroj por TEA-100-jariĝo
31 - vendredo	20.00 - Tombolo!!! Kun riĉaj premioj kaj certigita amuziĝado!
Aprila Programo	
04 - mardo	20.00 - Laboroj por TEA-100-jariĝo
07 - vendredo	20.00 - Diapozitivaj de Anita
11 - mardo	20.00 - Laboroj por TEA-100-jariĝo
14 - vendredo	20.00 - Dua tradukvespero pri sensoj
<b>16 - dimanĉo</b>	<b>Bonan Paskon al ĉiuj!</b>
18 - mardo	20.00 - Laboroj por TEA-100-jariĝo
21 - vendredo	20.00 - Laboroj por TEA-100-jariĝo
25 - mardo	Sidejo fermita
28 - vendredo	20.00 - Trafoliumante PIV-on!
<b>Marde, je la 18<sup>a</sup> h, progresiga kurso</b> <b>Merkrede, je la 18<sup>a</sup> h, Koruso VERDAJ ANĜELOJ</b> <b>Vendrede, je la 18<sup>a</sup> h, unuagrada kurso</b>	

## Romano Bolognesi a Triest

Tra ottobre e novembre, in data e luogo ancora da stabilire, sarà nostro gradito ospite il dott. Romano Bolognesi, che terrà delle conferenze sui seguenti temi:

1. "L'uomo inventa la lingua. All'origine della comunicazione culturale umana".
2. "L'uomo inventa il numero. All'origine del contare e calcolare".
3. "L'uomo scopre il tempo. All'origine del calendario".
4. "L'uomo inventa la scrittura. Dall'ideogramma all'alfabeto".

Ulteriori informazioni presso la segreteria della TEA.

## LA GAZETO

Ĉu vi jam renovigis vian abonon al LA GAZETO? La abono egalas al 28 € kaj por novaj abonantoj estas speciala, aparta, tre interesa rabato! Por pliaj informoj, poŝte, rete aŭ telefone, vidu ĉi sube.

Abon-peranto por Italio

Elda Doerfler – Via Ghirlandaio 18/1 – 34138 Trieste  
tel. 040 398562 - [testudo@adriacom.it](mailto:testudo@adriacom.it)  
Poŝta konto: N° 17452996 Trieste Centro



TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO  
ASS. ESPERANTISTA TRIESTINA

## Cent Jaroj de Esperanto en Triesto Programo dum la jaro

- ❖ Solena Diservo kun kantoj, en esperanto - sabaton la 13<sup>an</sup> de majo, je la 18<sup>a</sup> h, Preĝejo *Beata Vergine del Rosario, piazza Vecchia*
- ❖ "Kara amiko, mi skribas al vi... 100 jarojn poŝtkarte" - en junio, ĉe Palaco *Costanzi*, prestiĝa komunuma salono centre de la urbo. En la inaŭgura tago aperos poŝta stampo pri centjariĝo de TEA; poste dum ses tagoj ĉiuj korespondaĵoj el *Trieste* kaj *Gorizia* surhavas porokazan afrankstampon. Krome eldonitaj estos du diversaj poŝtkartoj pri la evento. La ekspozicio daŭros ĉirkaŭ tri semajnojn.
- ❖ Internacia Renkontiĝo "Inter Karsto kaj Adriatika Maro" - 6-12 aŭgusto - vidu la pli detalan provizoran programon, ĉi-kolumne.
- ❖ Eldono de libro pri historio de la Esperanto-movado en Triesto.
- ❖ Korusa vespero: sinprezento de tri diversnaciaj Korusoj (*fiksota dato*).
- ❖ 1<sup>a</sup> Tutregiona Esperanta Renkontiĝo (*fiksota dato*)
- ❖ Ĝemeliĝo kun la Esperanto-Societo Rijeka (*fiksota dato*).

### INTER KARSTO KAJ ADRIATIKA MARO

1<sup>a</sup> Internacia Somera Renkontiĝo  
Triesto, 6-12 aŭgusto 2006

#### 6 aŭgusto - dimanĉo

alveno de partoprenantoj  
*vespere*: nokta promonado tra la urbo

#### 7 aŭgusto - lundo

*matene*: ĉe la maro, naĝado kaj sunumado  
*posttagmeze*: vizito de la Giganta Groto kaj Karsta Botanika Ĝardeno

*vespere*: en urbo, vizito de ekspozicio pri *Andy Warhol*

#### 8 aŭgusto - mardo

tuttaga ekskurso - promonado en Karsta triesta lando  
*vespere*: Muzeo ORTO LAPIDARIO, muzika vespero

#### 9 aŭgusto - merkredo

*matene*: ĉe la maro, naĝado kaj sunumado  
*posttagmeze*: vizito de la Mara Rezervejo-Muzeo, Kastelo kaj Parko de *Miramare*  
*vespere*: teatraĵo

#### 10 aŭgusto - ĵaŭdo

*matene*: vizito de la urbocentro kaj diversaj konfesiaj preĝejoj

*posttagmeze*: ŝipe al apuda urbeto *Muggia*, vizito de la katedralo kaj malnova urbocentro

*vespere*: teatraĵo en la urbo

#### 10 aŭgusto - vendredo

*matene*: vizito de Kastelo kaj Katedralo de Sankta Justo  
*posttagmeze*: vizito de la Kastelo de Duino, Karsta panorama promonado desur la rokoj al la maro, laŭ la pado "RILKE"

*vespere*: teatraĵo en la urbo

## 11 aŭgusto - sabato

*matene:* ĉe la maro, naĝado kaj sunumado, aŭ libera vagado tra la urbo por aĉetumado  
*posttagmeze:* ĝisrevidoj!

**Partoprenkotizo: € 400 persone. Ĝi inkluzivas: 6 (ses) tranoktadojn en centrurba hoteleto, 6 (ses) tagmanĝojn, 3 (tri) vespermanĝojn, enirbiletojn por vizitoj de Parko kaj Kastelo de Miramar, Kastelo de Duino, Giganta Groto, Karsta Botanika Ĝardeno, muzeoj kie tio eblos. Rekomendindas kiel eble plej frua sinanonco.**

**Poŝta adreso:**

**Esperanto Trieste - CP 601 - IT-34100 Trieste**

**Retadreso:**

**noredv@tele2.it; testudo@adriacom.it**

**Telefonnumeroj, landa prefikso ++39**

**040 350093; 040 763128; 040 398562**



## Triĝsto kaŝita

Malkovru nekonservitajn ĝojn  
de nia urbo!

### La unua elekto-budo

En 1848, la unuan de decembro, inaŭguriĝis la nova sistemo por publika elektro-lumigado. La unuaj kvin budoj de la elektra distribuado, estis starigitaj en la ĉefaj urbo-lokoj: en placo de la Stacido (nuntempe de Libereco), Akvedukto (aleo XX

Septembro), placo *Goldoni*, Korso *Italia* kaj placo de la Borso. Nur tiu ĉi lasta, kvankam ne plu funkcia, rezistas ankoraŭ, spite al la nuna modernisma tendenco kaj la forkonsumiĝo. La budo estas fere konstruita kun florstilaj ornamaĵoj kaj dekoracioj. Ŝajnas blovo el la "Bela Epoko" centre de la pulsanta urbokoro.

**3ESTULO**

## Ek al media ekologio per eltrovitaj rimedoj!

Ekde nuna numero de TEA-Bulteno mi prezentas al vi novan rubrikon, al kiu ĉiu el vi povas kontribui, sendante plej lastajn novaĵojn pri aktuala(j) sistemo(j) ĵus aŭ antaŭ nelonge enkondukita(j) en via urbo/regiono/lando, cele al plibonigado kaj konservado de la natur- kaj hom-medioj. Precipe en urboj, en grandaj industriitaj urboj, problemoj pri poluado estas enormaj, malfacile solveblaj, kaj daŭre kaj strebe oni devas sindediĉi por - se ne entute solvi ĝin - almenaŭ parte malpliigi la danĝeran efikon de medimalkpurigado: ĉiu, eĉ malgranda, iniciato, farita por plibonigi la nunan staton de poluado, havas siajn sencon kaj utilon - ja, ...*eĉ guto malgranda, konstante frapanta, traboras la monton granitan...*

Esperable, danke precipe al via kunlaboro, ĉi rubriko fariĝos konstanta ero de nia Bulteno kaj ni ĉiuj estos informataj pri la plej diversaj klopodoj, tra la mondo. Ni strebu transdoni al nia posteuloj teran planedon ankoraŭ viveblan kaj vivindan, ni lernu el niaj eraroj taŭgan

manieron por konservadi la ankoraŭ ekzistantajn naturrimedojn, plene respektante ĉiun flaŭran kaj faŭnan estaĵon kaj finfine forlasante tiun danĝeran vojon direktan al senlima ekspluatado de la Naturo.

**ELDA**

## En Padova

## Metrotramo: estonta ekologia urba transportilo

Ĝi havas elektran motoron, sed ne estas trolebuso; ĝi moviĝas sur unu relo, sed ne estas tramo; ĝi cirkulas per gumaj radoj, sed ne estas aŭtobuso! Ĉi tiu tute nova



trafikilo estis baptita: METROTRAMO, kaj komencos trafiki laŭ la stratoj de Padova ekde venonta somero. Oni eltrovis ĉi tiun rimedon, por klo-

podi solvi la urĝajn problemojn de tro densa trafiko en la historia centro de Padova, kio cetere estas problemo komuna al ĉiuj italaj urboj. Kie per aŭtobusoj oni ne sukcesas kontentigi la pliiĝantajn postulojn de publika trafikado (interalie, ĉi-kaze oni devas konsideri, ke tio kaŭzus eĉ pli intensan aerveenadon, pro la eliganta gaso!); kie la urba administracio ne havas monrimedojn por ekipi per subteraj metrooj; kie la strukturado de la urbocentraĵoj ne permesas iradon de tramoj, tie povas helpi la METROTRAMO.

Realigita de la franca Grupo *LOHR*, la METROTRAMO en Padova sekvos linion longan 10 km-ojn, kiu trairas la tutan urbon, de sudo al nordo. Dum la irado ĝi haltas 22 fojojn. La METROTRAMO konsistas el 3 vagonoj, kies pavimo situas je 23 centimetroj de-tere, kaj povas transporti 164 pasaĝerojn. Tiu longa veturilo cirkulas laŭ ununura centra relo, kio garantias la milimetre precizan respekton de trajektorio, kaj sukcesas iri eĉ laŭ plej etaj stratoj danke al ties rimarkinda ĝirpovo, donita de la gumaj radoj kiuj, interalie, malpliigas la bruon kaj reduktas la transmision de vibroj al la ĉirkaŭantaj domoj.

Fine, tre grave estas, ke ĝin movigas elektraj motoroj, kiuj, alligitaj al specifaj baterioj, permesas trairadon de la tuta centro je 30 km/hore sen uzado de tiuj malestetikaj aeraj stangoj kaj kurento-konduktiloj. En la urba ĉirkaŭaĵo, kie la linio estas pli longa kaj la veturiloj povas plirapidi, aerstangoj kaj kurento-konduktiloj permesas reŝargadon de la akumulatoroj kaj pli superan rapidecon.


***Imitinda sistemo, ĉu ne? Jen alia paŝo al pli pura enspirenda aero eĉ meze de urboj!***



**vanità**

**Ina vestaĵaro  
Ĉio por novedzino**

**VANITÀ sas**  
di Dodi B. & Dei Rossi R.  
34122 TRIESTE  
Corso Italia, 37 - Tel. 040 632340  
Cod. Fisc. e part. IVA 00082530320



## Recepto pri paco

Ĉifoje tute specialan recepton Egle proponas al vi, recepton kiun povas prepari iu ajn, ĉiuloke tra la mondo, ĉar ties ingrediencojn eblas trovi ĉie, ilia kosto estas nula, sufiĉas malfermita koro kaj iom da bonvolo. Elprovu ĝin kaj informu nin pri la rezultoj!

Ingredienoj por la tuta homaro	
unu manpleno da solidareco	
du gutoj da naiveco	
iom da zorgemo	
unu pinĉaĵo da talento	
unu kulero da frateco	
unu kulero da interligiteco	
fine, iom da pacienco	
afableco kiom sufiĉas	

### Preparado:

Knedu molan paston: metu ĝin en larĝmezuran rostopoton kaj je malforta fajro komencu la kuiradon.

Se vi deziras, vi povas aldoni bonecon kaj dozon da feliĉo. Sed atentu, mi petas, subrostanton oni devas fari je

malvigla fajro! Kaj nun kirlu ĝin dum la tuta vivo! Sed ankoraŭ ne komplete donita estas la recepto: kiam ĝi bongustos, eĉ manĝu ĝin, tio bonefikas al la koro. Krome, kaze de malgajeco, ĝi estas efika rimedo. Nu, vere potenca estas la paco!

## RIDANGULO

Sekura naĝado.

*Joĉjo plendas:* Panjo, kial mi ne rajtas naĝi en la maro!?

*Jozefino:* Ĉu vi ne vidis la avertilon? Estas ŝarkoj en la akvo!

*Joĉjo:* Sed paĉjo naĝas!

*Jozefino:* Tio estas alia afero. Via patro havas vivasekuron.



“Temas pri nova kontraŭdeprimilo: anstataŭ ĝin engluti, vi jetegas ĝin kontraŭ iun ajn, kiu ŝajne bonhumoras”.

**Kiu ne riskas, tiu ne gajnas.**

**Plej granda potenco kuŝas en la komenco.**

# Solvo de la Kvizoj

## SORĈA KVADRATO Solvo 1

1	3	5	6	4	2	21
3	2	4	5	6	1	21
5	4	6	2	1	3	21
6	5	2	1	3	4	21
4	6	1	3	2	5	21
2	1	3	4	5	6	21

21 21 21 21 21 21

## SORĈA KVADRATO Solvo 2

1	2	3	4	5	6	21
2	3	1	6	4	5	21
3	1	5	2	6	4	21
4	6	2	5	1	3	21
5	4	6	1	3	2	21
6	5	4	3	2	1	21

21 21 21 21 21 21

Alvenis entute tri korektaj respondoj, ĉiu el ili malsama, sed tio ne gravas: gravas ke la rezulto estu ĝusta. Partoprenis en la ludo Roberto Maglica el Poreĉ, Angelica Nocent el Triesto kaj Ermigi Rodari el Milano. Sed ne nur korekte ĉiuj respondis al la unua kvizo sed ankaŭ al la dua, nome al tiu pri instruistoj kaj gepatroj. Pri la demando: *Ĉu vi povas diveni kiom da instruistoj kaj kiom da gepatroj ĉeestis tiun renkontiĝon?*, la respondo ĝusta estis:

**Ĉeestis 23 gepatroj kaj 8 instruistoj.**

Gratulegon al la lertaj solvintoj!

La diino Fortuno hazarde lotumis la jenan nomon:

**Ermigi Rodari el Milano**

al kiu estos sendita, kiel premio, videofilmo pri Triesto.

## Esperanto dum la Olimpiaj Ludoj en Torino

Esperanto-Centro Torino, kun patronado de la Organiza Komitato de la Olimpiaj Ludoj, realigis Kompaktan Diskon pri Esperanto, en kiu i.a. oni atentigis pri la komunaj celoj de la lingvo internacia kaj la tutmondaj ludoj. Ĝi estis disponigita al la 800 ĵurnalistoj el la tuta mondo, tie kunvenintaj. Krome, danke al nekomparebla laboro farita de Alessandro Dematheis, estis tradukita esperanten kaj eldonita de *Città di Torino* informilo pri la gastiganta urbo. La kolora broŝuro “Torino ĉiam moviĝanta” estis disdonita en la diversaj informoj dise tra la urbo, en kvanto de 8 mil ekzempleroj.

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Sidejo: Via Coroneo 15 - 34133 Trieste

tel/fakso: +39 040 763128

Reto: [esperantotrieste@adriacom.it](mailto:esperantotrieste@adriacom.it); [noredv@tele2.it](mailto:noredv@tele2.it)

Grupa tt-ejo: [//it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatristina](http://it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatristina)

Poŝta adreso: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio  
Poŝtĉekkonto N° 10834349